GISTO, DEC 2005
G.O.Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS

Z-FESTO.

La naskigxofesto de nia Onklo Lucxjo (15/12) chi-jare okazis en la sabato 17/12, en GEA, POA-RS. Esperantistoj laboras chiutage, tial oni indikis la sabaton por la festa renkontigxo memore al nia majstro Zamenhof. Cheestis bela nombro da gesamideanoj. Tamen, malgraù ke, post la ceremonio servotis frandajxoj, mankis pluraj tre aktivaj kompanoj de nia trancheo, kiel Ennio kaj Oswaldo kaj iliaj najbaroj(Torres) krome Karesema, Nitha (laù enretaj nomoj) kaj aliaj - Nia klera prezidanto Marcelo malfermis la festan etoson per sagxe arigitaj plibonigajxoj en laGEA-sidejo. Okazis disdonado de atestiloj al pluraj kursfinintoj. Varmajn komplimentojn al chiuj, kun memorigo, ke surpapera atestilo utilas nur por montri iom da fiero. Kio vere validas ja estas plena scio, akirenda per multa, multaj legadoj dum mankas oportunoj babili aù aùskulti la amikaojn de China Radio Internacia, laù 9860 Khc, chiutage je la oka vespere (nuntempe). Marcelo kronis la ceremonion per Pregxo, ne per formalaj vortoj sed jes per la **Pregxo sub la Verda Standardo**, de Z. La oran juvelon Marcelo montris al chiuj per sia lerto, deklami parkere,, sen stumbli, kun varma fervoro de homo kiu korpremite petegas ion, ne por si mem sed por la tuta HOMARO. Valora junulo Marcelo, krom tutkore laùdi vian grandan ekzemplodonan kapablon, mi tre esperas ke la admirinda kuragxo, parkerigi longan poezion, trafis fekundajn korojn en la gaùcharo,.chefe korojn de niaj junulinoj kiuj sorchos la spektantojn. Ni memoru ke, interparoli chirkaù luncheja tablo, ne tre altiras la atenton de chirkaùestantaj klientoj sed, se homo starigxas kaj laùtvoche, per fidoplena kapablo, parolas li/sxi (chu sxli, Luis?) estas tuj atentata. Same, se iu laùtlegas texton. Multe pli elstaras ago de homo kiu , parkere recitas poezion aù, ankoraù pli okulfrape, se ne nur recitas sed jes deklamas, aldonante emfazajn elstarojn al pli signifoplenaj eroj dum la interpretado Inter ni oni havas, laù mi, plus Zelja kaj Kleonise. Ili montris kapablon kaj talenton. Domagxe, pro la prokrasto de la evento, mi ne povis resti gxis la fino kaj aldoni mian kontribuan ereton. Ne restis al mi unu nura minuto, por gustumi biereton. Ne sufichis tempeto por trinki tason da kafo antaù ol mi devis enbusigxi. Ni zorgu!. Malakurateco multfoje kulpas pri fatalajxoj, certe ankaù en Esperantio.

INTERESA REZONADO

Far Claude Piron.

Dio kreis la liberon. Esti libera signifas rajti fari stultan aù achan decidon. Dio estas en chio, do ankaù en heroino kaj kokaino. Se Dio enestas chion (oni lernas), Li enestas ankaù homon , kiu sorbas tiujn sed, pro sia (ne Dia) libera elekto. Dio estas ankaù en la sufero kiu rezultas. // Dio estas kiel sango en homo; sen gxi oni ne vivus.// Kiam mi tajpas, fakte Dio tajpas sed mi, erarema estajxo iom fusxas diajn fingromovojn, pro tio la

dia mesagxo, kiun vi ricevas, eble estas malbonigita versio".

Piron' disvolvas sian tekston sur pluraj pagxoj,(11) kiuj igas seriozan leganton cerbumi pri la kurantaj religiaj teorioj. Prunte ricevita de nia amiko Verda Kafano Zaghetto, mi disponigas la tekston al kiu ajn volas sperti maloftajn konceptojn pri Dio, vorto inkluzive uzata minuskle, pravigita de Piron'. – Legu kaj situigu, vin mem, laù via tradicia konduto, rilate al Dio kaj/aù al minuskla dio.

NE ZORGU PRI MI.

Post kiam mi mortis, bonvolu ne desxiri florojn miakaùze. Oni lasu ilin kie ili burgxonis. Tie ili utilas naturajn celojn. - Bonvenos, sur memorsxtono, simpla skribo: "Chi-tombe restadas esperantisto. Li amis lertajn gesamideanojn, zorgis pri animaloj kaj chirkaùmedio". – Sed, miaj karaj geamikoj, ne urgxu. Mi esperas ke vi bonvolos toleri miajn mankojn ankoraù dum kelkaj jaroj.

SERPENTOJ

Ofte oni trovas sur kamparaj vojoj mortigitajn serpentojn ne venenajn. \Korsxiras tia stulta ago de ventkapuloj kiuj mortigas chiun beston, kiu aspektas timiga aù malbela. Tiaj homoj malbonon faras pro ilia ignoro kaj maldiligenta karaktero Kial ili ne petas ke lertulo, kiu scias distingi venenajn de nevenenaj serpentoj instruu ilin?. Chi-lastaj estas eroj de kateno inter bestoj kiuj tenas la ekvilibron de naturaj medioj. Ili kaptas kaj voras multspecajn nocajn animaletojn kaj insektojn. Domagxe,la Biblio multe pezas kontraù serpentoj pro la kondamno de la serpento, char gxi trompis la unuan virinon kreitan de Dio, ke gxi suferu la dispremon de gxia kapo.... Jen ero pridubinda, chu Dio vere igis registri tiun frazon kiu pravigas misteran timon je tiuj povraj bestoj, kiuj ne posedas kaj piedojn kaj brakojn por sin defendi. –Legeblas ankaù aliaj eroj kiuj vere ne redonas chioscian econ de Dio. Tiujn dubindajn erojn mi opinias, oni metu sur la kontojn de Bibliotradukistoj.

CHO_RO_I

Nuntempe oni komforte aùdas gxin per signalo S-9++, laù R-amatora difino por modulado facile komprenebla, dês pli pro gxiaj nunaj geparolistoj, kiuj plejzorge prononcas chiun vorton kaj ech emfazas elstarigendajn erojn, same kiel nacilingvaj veteranaj parolistoj. Aldone estas frandeblaj keldaj enkondukaj vortoj de nia estimata, emerita Roza. Karaj legantoj, BV aùskulti ilin kaj opinii, al mi aù, prefere, rekte al la Radio.

HUMURO

Se vi iam legis chi-suban achan anekdoton, rabaton mi petas al vi, kara leganto, char la provizejo de ridigaj faktoj en la nuna stato de la brazila logxantaro draste sxrumpis. Jen, el DG:

-KOKRADO

Anonima latero avertas: Maneko, mia kara amiko, mi tre bedaùras tamen mi devas informi vin ke, via edzino trompas vin kun via plej fidela amiko.

Senlime kolerega li iras al sia dormochambro, malfermas tirkeston kaj elprenas sian revolveron, iras al la fundo de la korto kaj trifoje pafas sian hundon.

Al vi chiuj jensxatata rimaro:

NovaJarSaluto:

Da prospero granda aro
Kaj da sano plena maro
Vin felicha,
Riche-richa igu en la jaro.
Kaj se tamen, mia karo
Trafus vin malsukcesaro,
Firma estu,
Tia restu dum la tuta jaro.
Se vin volus chagrenaro
Turmentadi (fia faro)!
Chiufoje
Ridu gxoje en la Nova Jaro.